

A. 34

ESPERANTO-KLUBBEN  
Holbæk

Biblioteko de «La Suno Hispana»  
Biblioteko de «La Suno Hispana»

48.

27.10.06.

# Kuracisto per batoj

TRIAKTA PROZA KOMEDIO

DE

LEANDRO FERNÁNDEZ MORATIN

Esperanten tradukis

VICENTE INGLADA

---

*Vertere modum formidine  
ne fustis.*—HORAT. Epist. I,  
Lib. II.

---

**Prezo: 0'50 ptoj.**

VALENCIA:

TIPOGRAFIA MODERNA, AVELLÁNAS, 11

1906



A. 34.

ESPERANTO-KLUBBEN  
Holbæk

48.

Biblioteko de «La Suno Hispana»

Frk. Astrid Rybo,

Viceinspektrino,

Kommuneskolen ved Sundholm.

# Kuracisto per batoj

TRIAKTA PROZA KOMEDIO

DE

LEANDRO FERNÁNDEZ MORATIN

Esperanten tradukis

VICENTE INGLADA

---

*Vertere modum fermdine  
ne fastis.*—HORAT. Epist. I,  
Lib. II.

---



VALENCIA:

TIPOGRAFIA MODERNA, AVELLANAS, 11

1906

FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

5084

## PERSONOJ

DON GERONIMO. <sup>1</sup>

DONJA PAŬLINO. <sup>2</sup>

LEANDRO.

ANDREINO.

BARTOLO.

MARTENINO.

GINESO.

LUKO.

La sceno prezentas arbaron en la unua akto, kaj en la du sekvantaj saloneton de privata domo, kun funda kaj ambaŭflankaj pordoj.

*La agado komenciĝas je la dekunua horo matene kaj finiĝas je la kvara posttagmeze.*

---

<sup>1</sup> Moŝta hispana titolo samvalora ol sinjoro.

<sup>2</sup> Sama titolo kiel *don* aplikita al virinoj.

16x2003 hef008039ja

# KURACISTO PER BATOJ

## AKTO I

### SCENO I

**Bartolo, Martenino.**

BART.—Dio min helpu, kiel malmola estas tiu ĉi trunko! La tranĉrando de l'hakilo tute endentiĝas kaj ĝi ne dispeciĝas... (*Li dehakas lignon el arbo staranta en malantaŭaĵo de la sceno; poste, li demetas hakilon apud la trunkon, ekiras al antaŭsceno, sidigas sur ŝtonegon, eltiras el poŝo silikpecon kaj fajrerilon,<sup>1</sup> ekbruligas cigaredon kaj ekfumas.*) Tre klopoda estas tiu ĉi laboro!... Kaj ĉar hodiaŭ la varmo premas, mi estas laca, lacega kaj mi plu ne povas... Mi haltigu la laboron, kaj estos plej bone; tie ĉi restos ĉio kaj mi finos, kiam mi revenos. Nun bone taŭgos iometo da ripozo kaj cigaredo, ke tiun ĉi malgajan vivon alia viro heredos... Jen tie alvenas mia edzino. Kion bonan ŝi alportos?

---

<sup>1</sup> *Peco el fero, kiu frapante sur silikan ŝtoneton elnaskas fajrerojn, kiuj ekbruligas apudan meĉaĵon.*

MART.—(*Eniras tra la dekstra flanko de l' teatro.*)

Mallaboremulo, kion vi faras tie sidanta, fumanta kaj nelaboranta? Ĉu vi scias, ke vi ja devas fini la dehakon de tiu lignaĵo por ĝin forporti en la vilaĝon, kaj jam tagmezo estas proksima?

BART.—Bone, se ne hodiaŭ, morgaŭ tio estos farita.

MART.—Jen bela respondo!

BART.—Pardonu min, edzino, mi estas laca kaj sidiĝis momenton por fumi cigaredon.

MART.—Kaj mi ja devas toleri edzon tiel mallaboreman kaj senokupeman! Leviĝu kaj laboru!

BART.—Atentu, edzino, mi ĵus sidiĝis.

MART.—Leviĝu.

BART.—Nun mi ne volas, malkruda edzino.

MART.—Viro senhonta kaj malatentanta siajn devojn Ho, ve al mi!

BART.—Ho, kia penado estas havi edzinon! Seneko bone diras, ke la plej bona estas pli malbona ol demono.

MART.—Atentu tiel lertan viron, kiu citas aŭtoritaton de Seneko.

BART.—Ĉu duboj pri mia lerteco? Nu, bone, trovu arbohakiston sciantan, kion mi scias, kaj servintan, kiel mi, al ia latina kuracisto dum ses jaroj, kaj ellernintan la *quis vel qui, quæ quod vel quid* kaj iom plu, kiel mi mem ellernis.

MART. — Malbonon al horo, en kiu mi edziniĝis kun vi.

BART. — Kaj estu malbenata la artifika aktisto,<sup>1</sup> kiu aranĝis la aferon.

MART. — Mallaboremulo, drinkulo.

BART. — Edzino, atentu, atentu.

MART. — Mi igos vin plenumi viajn devojn.

BART. — Zorgu, virino, ke vi jam min ekkole-rigas.

(*Li sin levas elpuŝante siajn membrojn, ekiras al postsceno, kaptas de sur la tero vergon kaj revenas.*)

MART. — Kaj per kio, tio min tuŝas, senhontulo?

BART. — Atentu, ke mi vin batos, Martenino.

MART. — Vinplenulo!

BART. — Atentu, ke mi trabatos vian dorson.

MART. — Malnoblulo.

BART. — Atentu, ke mi rompos al vi la kapon.

MART. — Al mi? Fripono, malbonulo, kanajlo, al mi?

BART. — Al vi? Do, jen vi havas. (*Li batadas Marteninon.*)

MART. — Aj! aj! aj! aj!

BART. — Tiu estas la sola rimedo, ke vi silen-tiĝu... Sed, aŭdu. Mi volas, ke ni repaciĝu. Donu al mi vian manon.

<sup>1</sup> Notario.

MART.—Nun, kiam vi tiel estas min traktinta?

BART.—Vi rifuzas? Tio estis ja bagatelo, kontentu.

MART.—Ne, mi ne volas.

BART.—Akceptu, edzineto.

MART.—Mi ne volas, ne.

BART.—Malbonon al miaj manoj, kiuj estis kaŭzo por malplezurigi mian edzinon... Nu, alvenu, donu al mi ĉirkaŭpremon.

*(Li flanken forjetas la vergon kaj sin ĉirkaŭpremas.)*

MART.—Ho, se vi diskreviĝus!

BART.—Jen, ŝi ja min amegas, la malfeliĉuline-to!... Pardonu min, mia edzineto. Ĉe du, kiuj bone amas sin reciproke, dek aŭ dekdu bastonbatoj plie aŭ malplie, signifas nenion... Mi foriras al montfosaĵo, kie mi jam kolektis amaseton da arboradikoj, el kiuj mi faros faskon kaj ni morgaŭ portigos ĝin sur la azenino al Miraflores'. *(Li faras kvazaŭ li foriras kaj tuj revenas.)* Aŭdu, baldaŭ estos foiro en Bujtrago, se mi tien iros, kaj havos monon kaj pri tio rememoros, kaj vi min tre amos, mi aĉetos al vi ornaman kombileton el konkajo kun bluj ŝtonetoj.

*(Li deprenas la hakilon kaj bissakon<sup>1</sup> kaj ekiras antaŭen al la monto. Martenino restas flankaparte, parolante al si mem.)*

MART.—Iru, do, ke mi ja pagos al vi... Estas

<sup>1</sup> Bis'sako=sako kun du poŝoj.



vere, ke virino ĉiam havas preta manieron sin venĝi al sia edzo; sed ĝi estas puno tre delikata por tiu fripono, kaj mi volus alian, alian, kiu pli trafu lin, kvankam al mi ne tiom plaĉu.

## SCENO II

**Martenino, Gineso, Luko** (*kiuj venas de maldekstra flanko.*)

LUKO.—Nu! ni ambaŭ ja alprenis bonan komision... kaj mi ankoraŭ ne scias, kian rekompenccon ni ricevos por tiu ĉi laboro.

GIN.—Paciencon, amiko Luko! Estas ja devige obei al nia mastro, krom tio, la farto de lia filino interesas nin ĉiujn... Ĝi estas fraŭlino tiel afabla, tiel gaja, tiel bela... ke ŝi ja ĉion meritas.

LUKO.—Tamen, amiko, tre grave estas, ke ĉiuj kuracistoj, kiuj iris ŝin viziti, ne eltrovis, kia estas ŝia malsano.

GIN.—Ŝia malsano estas tre okulvidebla; sanigilo, jen kion ni bezonas.

MART.—(*Flanken.* Kaj mi ne eltrovas ian artifikon por min venĝil)

LUKO.—Ni vidos, ĉu tiu kuracisto de Miraflores' trafas la celon... Se ni ne trompigis pri la voĵeto...

MART.—(*Flanken, ĝis ŝi ekvidas ambaŭ virojn kaj gentile ilin salutas.*) Kaj tio estas ja necesa, ĉar la batojn, kiujn li ĵus donis al mi, mi ankoraŭ sen-

tas ĉe la ĥoro. Mi ne povas ilin forgesi... Sed, sinjoro, pardonu ke mi ankoraŭ ne vidis vin, ĉar mi estis distrita.

LUKO.—Ĉu ni bone iras, sur vojo al Miraflores?

MART.—Jes, sinjoro (*signante per mano internen, tra la dekstra flanko*). Ĉu vi vidas tiujn murojn renversitajn apud tiu granda juglandarbo? Nu, tien, tute rekten.

GIN.—Ĉu tie ne loĝas fama kuracisto, kiu estis kuracisto de ia vicgrafineto, kaj profesoro kaj ekzamenisto, kiu estas akademiano kaj kuracas greke ĉiujn malsanojn?

MART.—Ho ve, sinjoro! Li greke kuracis, sed antaŭ du tagoj li hispane mortigis kaj li jam kuŝas sub tero, la malfeliĉuleto!

GIN.—Kion vi diras?

MART.—Kion vi aŭdis. Kaj por kiu vi iris lin serĉi?

LUKO.—Por fraŭlino, kiu vivas proksime de tie ĉi, en tiu kampardomo apud la rivero.

MART.—Ah!, Jes, la filino de Don Geronimo Dio min helpu! Kaj kio estas al ŝi?

LUKO.—Mi ne scias. Ŝi havas malsanon, de neniu komprenata, pro kiu ŝi fine perdis la eblon paroli.

MART.—Kia domaĝo! Sed... (*flanken kun elvigo de kontenteco*). Ho, kia ideo venas en mian kapon!) Nu, bone, jen ni havas la viron plej ins-

truitan el la mondo, kiu faras mirindaĵojn pri tiuj malesperigaj malsanoj.

GIN.—Ĉu vere?

MART.—Jes, sinjoro.

LUKO.—Kaj kie ni povos lin trovi?

MART.—Vi lin trovos dehakantan lignon sur ĉi tiu monto.

GIN.—Eble li pasigas la tempon elserĉante iajn resanigajn herbojn.

MART.—Ne, sinjoro. Li estas viro stranga kaj lunatika: li iras vestita kiel malriĉa kamparano: li obstinas sin montri ignoranta kaj maldelikata kaj ne volas malkovri la mirindan talenton, kiun Dio al li donacis.

GIN.—Vere estas mirinde, ke ĉiuj eminentuloj devas ĉiam havi ian ekmontron de frenezo, miksitita kun sia scienco.

MART.—La manio de tiu ĉi viro estas la plej aparta, kiun oni vidis. Li ne konfesos sian kapablecon, dum oni ne estos tute trabatinta lian korpon, kaj tiel mi avertas vin, ke ne agante tiamaniere, vi ne efektivigos vian intencon. Se vi trovas, ke li obstinadas nei, ĉiu el vi manprenu batilon, kaj batadu, ke li elkonfesos. Kiam ni lin bezonas, ni uzas tiun ĉi artifaĵon, kaj ĉiam la afero bone sukcesis.

GIN.—Kia stranga frenezo!

LUKO.—Ĉu oni povos trovi viron pli originalan

GIN.—Kaj kiel li estas nomita?

MART.—Don Bartolo. Vi facile lin ekkonos. Li estas viro de malalta statur, bruneta, mezaĝa, kun bluj okuloj, longa nazo, vestita per maldelikata drapo, kun ronda ĉapeleto.

LUKO.—Mi ja konservos eblon lin rekonĝi.

GIN.—Kaj tiu viro sukcesas en tiel malfacilaj malsanoj?

MART.—Ĉu sukcesojn? Mirakloj oni povas nomi liajn reŝanigojn. Antaŭ du monatoj mortis en Lozoja mizera virino: oni jam estis ŝin enterigonta, kaj Dio volis, ke tiu viro okaze sin trovu, en strato tra kiu iradis la ĉerka sekvantaro. Li alproksimiĝis, esploris la mortintinon, eltiris boteleton el sia poŝo, enverŝis en ŝian buŝon guton da mi ne scias kion, kaj la mortintino sin levis el ĉerko gaje kantanta.

GIN.—Ĉu estas eble?

MART.—Certe, ĉar mi ĝin vidis. Atentu, ne forpasis tri semajnoj de la tago, kiam ia knabo, ĉirkaŭe dekdujara, falis de la turo de Miraflores'; liaj kruroj derompiĝis kaj lia kapo iĝis kvazaŭ molpastaĵo. Nu, tiam oni vokis Don Bartolon, li rifuzis iri tien, sed dank'al bona trabatado, oni sukcesis lin konduki. Li eltiris ian ŝmirajon el kruĉeto, kiun li portis, kaj per plumo li ŝmiris kaj ŝmiris la malfeliĉan knabon, kiu post kelkaj momentoj leviĝis kaj kurante foriris ludi kun aliaj knaboj.

LUKO.—Nu, tiu viro estas ja, kiun ni bezonas. Ni iru lin serĉi.

MART.—Sed antaŭ ĉio, rememoru la averton pri batado.

GIN.—Bone, ni ja tion scias.

MART.—Tie, sub tiu arbo, ĉiujn batilojn vi trovos, kiujn vi bezonos.

LUKO.—Tie? Mi tuj kaptos paron da ili. (*Li prenas la vergon kiun sur tero lasis Bartolo, iras al postceno, deprenas alian, revenas kaj ĝin transdonas al Gineso.*)

GIN.—Estas ja bedaŭrinde, ke oni devas uzi tiun ĉi rimedon!

MART.—Se ne, ĉio vana. (*Ŝi faras kvazaŭ ŝi foriras kaj tuj revenas.*) Ha, alia afero! Zorgu, ke li ne sin eltiru, ĉar li forkuras kiel damcervo, kaj se li foriros antaŭ vi, vi neniam plu lin vidos. (*Rigardante internen, al postsceno.*) Sed jen, ŝajnas, ke li venas. Jes, li estas tiu. Mi foriras: parolu al li, kaj se li malobee ekkondutos, tiam al li senkom-pate. Adiaŭ, sinjoroj.

### SCENO III

#### Gineso, Luko.

LUKO.—Feliĉa sorto estis renkonti tiun virinon. Sed, ĉu vi ne vidas, kia kuracista elmontriĝo tie estas?

(*Ili ambaŭ rigardas postscenen.*)

GIN.—Mi jam lin vidas.. Atentu, ni dispartigi. nin, ĉiu en unu flankon, por ke li ne povu elkuru

Ni devas lin trakti plej ĝentile kiel eble. Ĉu vi komprenas?

LUKO.—Jes.

GIN.—Kaj nur en okazo, se ĝi estas nepre necesa...

LUKO.—Bone, vi tiam faros al mi signon, kaj tuj ni batos lin furioze.

GIN.—Nu, ni disiĝu, ĉar li alvenas.

(*Ili kaŝas sin en ambaŭ flankojn de teatro.*)

#### SCENO IV

Gineso, Luko, Bartolo.

(*Bartolo venas de la monto, kun hakilo kaj bissako surŝultre, kantante: li sidiĝas teren meze de la teatro kaj eltiras vinujon el bissako.*)

BART. En la kastelo Venusa,  
 Apud la Di' de l'planedoj,  
 En granda Konstantinoplo,  
 Tie, ĉe domo de Meko.  
 Kie ĉefsultan' Baĥao,  
 Tiel potenca regnestro,  
 La saĝul', kies tributojn  
 Ĉiuj pagas per riĉperloj,  
 Estro de sep imperioj,  
 Reĝo de... (*Li eltrinkas.*)  
 Reĝo de sepdek tri reĝoj,  
 Tia vir' havas filinon,  
 Heredantin' de la regno.

(*Li retrinkas kaj sin pretigas demeti la vinujon en la flankon, je kiu eniras Luko, kiu faras al li per sia ĉapelo ĝentilan saluton. Suspektante, ke oni volas forpreni lian vinujon, Bartolo sin pretigas meti ĝin en la alian flankon, samtempe kiam Gines' eniras same farante kiel Luko, Bartolo demetas vinujon inter siajn krurojn kaj surkovras ĝin per bissako.*)

For, tien, diablo. Kion serĉos tiu besto? Unue mi enkaŝos la vinujon... Jen! Alia burdo. Kia diablo estas ĉi tio? Ĉiuokaze mi ĝin entenos kaj kovros, ĉar ili ne prezentas mienon fari ion bonan.

GIN.—Ĉu vi estas kavaliro nomita sinjor' don Bartolo?

BART.—Nu, kio?

GIN.—Ĉu vi ja estas nomita don Bartolo?

BART.—Ne kaj jes: laŭ tio, kion vi deziras.

GIN.—Ni volas fari al vi tiom da komplezoj, kiom estos eble.

BART.—Se estas tiel, mi estas nomita don Bartolo.

(*Li deprenas sian ĉapelon kaj flanken ĝin metas.*)

LUKO.—Do, kun plena ĝentileco...

GIN.—Kaj plej granda riverenceco...

LUKO.—Kun tuta amemo, delikateco kaj bonplaĉo...

GIN.—Kaj kun plena respekto kaj plej humila estimego...

BART.—(*Flanken.* Ili ŝajnas arlekenoj, ĉe kiuj ĉio iĝas ĝentilaĵoj kaj plaĉmovoj.)

GIN.—Nu, sinjoro, ni venis petegi vian helpon por tre grava afero.

BART.—Kaj kion vi pretendas? Diru, ke mi faros kiom mi povos, se ĝi estas afero de mi dependanta.

GIN.—Favoro, kiun vi faras al ni... Sed, surmetu vian ĉapelon, ke la suno vin ĝenos.

LUKO.—Nu, sinjoro, surmetu la ĉapelon.

BART.—Nu, sinjoroj, mi jam surmetis ĝin. (*Lition faras, kaj ankaŭ la aliaj.*) Kaj nun?

GIN.—Ne strangu al vi, ke ni venis vin serĉi. La viroj eminentaj ĉiam estas serĉataj kaj elpetataj, kaj ĉar ni estas sciigitaj pri via superega talento kaj via...

BART.—Estas vere; ĉar mi ja estas viro lertega por dehaki lignon.

LUKO.—Sinjoro...

BART.—Se ĝi estos el kverko, mi ne liveros ĝin po malpli ol du realoj ĉiun ŝargaĵon.<sup>1</sup>

GIN.—Ni ne pritraktas nun tion.

BART.—Tiun de pino mi liveros pli malkare. Tiun de radiko, vi atentu...

---

<sup>1</sup> Amaso da ligno, kiun ordinare sur si portas homo aŭ besto, kiam oni transportas ĝin de unu en alian lokon.



GIN.—Ho, sinjoro, tio estas nin moki.

LUKO.—Mi petas, ke vi parolu alimaniere.

BART.—Sinjoro, mi ne scias paroli per alia maniero. Jen ŝajnas al mi, ke mi parolas tre klare.

GIN.—Tia viro, kiel vi, sin okupi pri ekzercoj tiel maldelikataj! Homo tiel klera! Tiel glora kuracisto? Ĉu li ne devas transigi al mondo, la talentojn, per kiuj la naturo lin dotis?

BART.—Kiu? mi?

GIN.—Vi, ne ĝin neu.

BART.—Vi kaj via tuta generacio eble estas kuracistoj, ĉar mi neniam estis. (*Flanken.* Ili estas drinkintaj.)

LUKO.—Por kio preteksti? Ni scias ĝin, kaj ĉio finita.

BART.—Sed, entute, kiu estas mi?

GIN.—Kiu? Eminentia kuracisto.

BART.—Kia sensencaĵo! (*Flanken.* Ĉu mi ne diris, ke ili ja estas drinkintaj.)

GIN.—Nu, ni finu, oni ne devas ĝin nei, ke ni ne venis en ŝerca celo.

BART.—Estu ial ajn venintaj, mi ne estas kuracisto, nek iam mi pensis pri tio.

LUKO.—Fine, mi opinias, ke estos necese... (*Rigardante Gines'on*) ne?

GIN.—Mi kredas, ke jes.

LUKO.—Fine, amiko Don Bartolo, jam ne estas tempo elkaŝi.

GIN.—Atentu, ke ni ĝin diras al vi por via bono.

LUKO.—Elkonfesu, je mil demonoj, ke vi estas kuracisto kaj ni finu.

BART.— (*Senpacienca.*) Mi furiozas.

GIN.—Por kio elŝajniĝi, se la tuta mondo ĝin scias?

BART.—Nu, mi rediras al vi, ke mi ne estas kuracisto.

(*Li sin levas, volas foriri; ili malhelpas kaj apudiĝas al li, sin pretigante lin trabati.*)

GIN.—Ne?

BART.—Ne, sinjoro.

LUKO.—Ĉu ne, do?

BART.—La diablo min forprenu, se mi iom taŭgas pri medicino!

GIN.—Amiko, ni, do, kun via bona permeso, devos uzi la antaŭkonsentitan rimedon... Luko.

LUKO.—Ja, ja.

BART.—Kaj kian rimedon vi aludas?

LUKO.—Jen ĝi. (*Ili batadas lin, atentante liajn movojn kaj malhelpante, ke li forkuru.*)

BART.—Aj! aj! aj!... (*Deprenante sian ĉapelon.*) Sufiĉe, ke mi estas ja kuracisto, kaj ĉio, kion vi volos.

GIN.—Nu! por kio vi devigas nin je tiu perforto?

LUKO.—Por kio altrudi al ni penon, ke ni vin disrenversu per battoj?

BART.—La peno estas por mi, kiu ilin ricevis... Sed, sinjoroj, ni konduku klare. Kio estas tio ĉi? Ĉu humoraĵo, aŭ ĉu vi estas frenezaj?

LUKO.—Ankoraŭ vi ne konfesas, ke vi estas doktoro de medicino?

BART.—Ne, sinjoro, mi ne estas. Ĝi estas ja dirita.

GIN.—Vi ne estas, do, kuracisto?... Luko!

LUKO.—Ne, do? (*Ili denove lin batas.*) He?

BART.—Aj! aj! Ve al mi! (*Li surgenuiĝas, kunmetante siajn manojn petsigne.*) Mi ja estas kuracisto. Jes, sinjoro.

LUKO.—Ĉu vere?

BART.—Jes, sinjoro, kaj ĉefĥirurgiisto, kaj sanigisto, kaj veterinaro, kaj enterigisto, kaj ĉio, kio oni devas esti.

GIN.—(*Ili ambaŭ kareseme lin levas.*)

Mi ĝojas, vidi vin tiel prudenta.

LUKO.—Nun vi ja elŝajnas viro saĝa.

BART.—(*Flanken.* Estu malbenata via animo!...) Ĉu eble mi estas ja kuracisto, ne ĝin konsciinte?

GIN.—Vi ne devas penti. Oni vin pagos tre bone por via asistado kaj vi restos kontentigita.

BART.—Sed, parolante jam en paso, ĉu estas vere, ke mi estas kuracisto?

GIN.—Tre vere.

BART.—Ĉu certe?

GIN.—Sen ia dubo.

BART.—Nu, la diablo min forprenu, se mi tion sciis.

GIN.—Kiel, do, se vi estas la plej eminenta profesoro, kiun oni konas?

BART.—*(Ridante.)* Ha! ah! ah!

GIN.—Kuracisto, kiu sanigis mi ne scias kiom da mortdangeraĵoj malsanoj.

BART.—*(Ironie.)* Dio min helpu!

LUKO.—Virinon, kiu estis jam enterigota...

GIN.—Knabon, kiu falis de turo kaj dispremeĝis al si la kapon...

BART.—Ĉu ankaŭ mi lin resanigis?

LUKO.—Ankaŭ

GIN.—Do, grandan kuraĝon, 'sinjor' doktoro. Oni celas asisti tre riĉan fraŭlinon, kiu loĝas en tiu kampardono, apud la muelejo. Oni tie donos al vi manĝi kaj trinki, kaj oni vin regalos kiel reĝon, ka! oni vin altdistinge traktos.

BART.—Ĉu oni min traktos altdistinge?

LUKO.—Jes, sinjoro, kaj post fino de la kuracado, oni donos al vi mi ne scias kiom da mono.

BART.—Nu, bone, ni tien vin. Altdistinge, kaj mi ne scias kiom da mono?... tien ni iru.

GIN.—Alprenu ĉiujn liajn aĵojn, kaj ni deiru.

BART.—Ne, iom post iom. *(Luko alprenas la bissakon kaj hakilon. Bartolo detiras de li la vi-*

*nujon kaj metas ĝin sub la brakon.*) La vinujo kun mi.

GIN.—Sed, sinjoro, medicina doktoro kun vinujo!

BART.—Tio ne estas grava, alportu... Oni bone donos al mi manĝi kaj trinki... (*Li flanken sin apartigas, meditas kaj parolas kun si mem. Poste kun ili.*) Mi palpos al ŝi la pulson, ordonos ian recepton... Mi sendube ŝin mortigos... Se mi rifuzas esti kuracisto, oni ree trabatos mian korpon, kaj se mi tie estas, ankaŭ min elbatos... Sed, diru al mi. Ĉu ŝajnas al vi, ke tiu ĉi maldelikata vesto estos taŭga por viro tiel sciencoplena kiel mi?

GIN.—Ne malĝoju pro tio. Antaŭ ol vin prezenti, ni vestos vin tre dece.

BART.—(*Flanken.* Se almenaŭ mi povus rememori pri tiuj frazaroj, pri tiuj fivortoj, kiujn mia mastro diradis al siaj malsanuloj... mi min eltirus el la kompromito.)

GIN.—Atentu, ke li volas forkuri.

LUKO.—Sinjor' don Bartolo, kion ni faros?

BART.—(*Flanken.* Tiu libro pri *vokabulorum* kiun la infano portis al kursejo. Tiu ja estis taŭga!)

GIN.—Bone, sufiĉe da meditado.

LUKO.—Ĉu eble estos necese alian fojon?...

(*Li faras signon rebati.*)

BART.—Kiel! Ne, sinjoro. Mi nur estis pensanta pri la resaniga plano... Malfeliĉeta Bartolo! Ni iru.  
(*Ili tenas lin inter si kaj kunforiras tra la maldekstra flanko de teatro.*)

## AKTO II

## SCENO I

**Don Geronimo, Luko, Gineso, Andreino.**

DON GER.—Do, vi diras, ke li estas tiel lerta?

LUKO.—Ĉiuj, kiujn ĝis nun ni vidis, estas tute sentaŭgaj konpare kun li.

GIN.—Li faras mirindajn resanigojn.

LUKO.—Li revivigas mortintojn.

GIN.—Tamen li estas iom stranga kaj lunatika, kaj ŝatas moki la tutan mondon.

DON GER.—Vin lasas min mirigita, post tiuj raportoj. Mi jam estas malpacienca lin ekvidi. Enkonduku lin, Gineso.

LUKO.—Li restis sin vestante. Alprenu la ŝlosilon kaj ne vin apartigu de li.

*(Li donas ŝlosilon al Gineso, kiu foriras tra la dekstraflanka pordo.)*

DON GER.—Li venu, li venu tuj.

## SCENO II

## Don Geronimo, Andreino, Luko.

AND.—Ho ve, sinjor' mastrol Malgraŭ, ke la kuracisto estas scienca mirindaĵo, ŝajnas al mi, ke nenio sukcesos.

DON GER.—Kial?

AND.—Tial ke donja Paŭlinjo ne bezonas kuracistojn, sed edzon, edzo ja taŭgos por ŝi; kia ajn alia rimedo celos nur supraĵe, ne funde. Ĉu vi opinias, ke ŝi resaniĝos per rabarbo, kaj laksiloj, kaj infuzajoj kaj herbotrinkaĵoj, kaj fiapotekaĵoj kaj malpuraĵoj, pro kiuj mi ne scias, kiel ŝia stomako ne eldifektiĝis? Ne, sinjoro, per bona edzo ŝi plene resaniĝos.

LUKO.—Nu, silentu, ne babilu sensencaĵojn.

DON GER.—La knabino ne pensas pri tio. Ŝi estas ankoraŭ tre juna.

AND.—Tre juna? Nu, edzinigu ŝin, kaj vi konstatos, ĉu ŝi estas tre juna.

DON GER.—Post kelka tempo, mi ne diras, ke...

AND.—Edziniĝon, edziniĝon, kaj ellasi al ŝi la doton kaj...

DON GER.—Ĉu vi silentiĝos, multvortulino?

AND.—(*Flanken.* Jen kio lin trafas...) Kaj elpeli kuracistojn kaj apotekistojn kaj forĵeti tra fenestro ĉiujn tiujn fitrinkaĵojn kaj alvoki la fianĉon, kiu ŝin resanigos.

DON GER.—Kiun fianĉon, sentaŭga babilulino kie estas tiu fianĉo?

AND.—Kiel rapide vi forgesas la aferojn! Nu, vi, do, ne scias ke Leandro ŝin amas, ŝin amegas kaj ke ŝi amrespondas? Ĉu vi tion ne scias?

DON GER.—Bonsorto estas ja por tiu Leandro, ke mi ne lin konas, ĉar de la tempo, kiam li havis ok aŭ dek jarojn mi ne lin revidis.. kaj mi ja scias, ke li rondiras spionante kaj observante ĉirkaŭ mia domo... kaj ja plej bone estos, se mi skribos al lia onklo, por ke li plenu kaj forkonduku lin en Bujtragon, kaj tie lin eltenu. Leandro! Jen bona edziniĝo, efektive! Kun junuleto, kiu ĵus fineliris el universitato kun sia kapo superplena de tekstoj kaj sen unu monero en sia poŝo!

AND.—Lia onklo, kiu estas tre riĉa, kora amiko via, kiu multe amas lian nevon kaj krom li, havas nenian heredonton, plenigos tiun mankon. Per la doto, kiun vi liveros al via filino, kaj per tio...

DON GER.—Foriru tuj de tie ĉi, demona langulino!

AND.—(*Flanken.* Jen kio lin trafas)

DON GER.—Foriru.

AND.—Mi ja foriros, sinjoro.

DON GER.—Iru, ke mi ne povas vin elporti.

LUKO.—Kaj ĉiam vi obstinas pri tio, Andreino! Silentiĝu, kaj ne enuigu la mastron, edzino; silentu, ke la mastro ne bezonas viajn konsilojn por fari, kion li volos. Neniam vin intermetu pri ne-



propraj aferoj: cetere, la mastro estas patro de sia filino, kaj lia filino estas filino kaj ŝia patro estas la mastro, kaj nenio helpos kontraŭ tio.

DON GER.—Via edzo bone diris, ke vi estas tre intervenema.

LUKO.—La kuracisto venas.

### SCENO III

**Bartolo, Gineso, Don Geronimo, Luko, Andreino**

*(Eniras de dekstre Gineso kaj Bartolo, tiu ĉi vestita per antikva frako, kun tripinta ĉapelo ka bastono.)*

GIN.—Jen vi havas, sinjor' don Geronimo, la admirindan kuraciston, la ĉiam maleraran doktoron, la miregon de l' mondo.

DON GER.—Mi multe ĝojas vin vidi kaj vin ekkoni, sinjor' doktoro.

*(Ili ĝentile salutas unu la alian, kun ĉapelo en mano.)*

BART.—Hipokrato diras, ke ni ambaŭ surmetu la ĉapelon.

DON GER.—Hipokrato tion diras?

BART.—Jes, sinjoro.

DON GER.—En kiu ĉapitro?

BART.—En la ĉapitro pri ĉapeloj.

DON GER.—Nu! Se tion diras Hipokrato, esto necese obei.

*(Ili ambaŭ surmetas siajn ĉapelojn.)*

BART.—Nu, daŭrigante, sinjor' kuracisto, sciinte...

DON GER.—Kun kiu vi parolas?

BART.—Kun vi.

DON GER.—Kun mi? Mi ne estas kuracisto.

BART.—Ne?

DON GER.—Ne, sinjoro.

BART.—Ne? Vi tuj, do, konstatos, kio al vi okazos.

*(Li sin fetas al li kun bastono levita en teniĝo lin bati. Don Geronimo forkuras, la servistoj sin intermetas kaj haltigas Bartolon.)*

DON GER.—Kion vi faras, sinjoro?

BART.—Mi faros, ke vi estos kuracisto per battoj, ĉar tiamaniere oni doktorigas en tiu ĉi lando.

DON GER.—Eltenu lin..., kiun frenezulon vi enkondukis tien al mi?

GIN.—Ĉu mi ne diris al vi, ke li estas tre ŝercema?

DON GER.—Jes, sed li iru en inferon kun tiuj ŝercoj.

LUKO.—Ne malkvietiĝu pro tio. Li ja faras ĝin por ridi.

GIN.—Sinjor doktoro, atentu, tiu kavaliro, kiu tie ĉi staras, estas nia mastro, kaj patro de la fraŭlino, kiun vi estas kuraconta.

BART.—Tiu ĉi sinjoro estas ŝia patro? Ho, pardonu, sinjor' patro, tiun liberecon, kiun...

DON GER.—Mi restas via.

BART.—Mi bedaŭras...

DON GER.—Ne, ĝi estis nenio... (*Flanken. Estu malbenata via kasto!...*) Nu, sinjoro, ni transiru al la afero. (*Li eltiras flartabakujon, ĝin prezentas al Bartolo, kaj prenetas polvotabakon kun afekta grayeco.*) Mi havas filinon tre... malbon...

BART.—Multaj patroj plendas pri la samo.

DON GER.—Mi volis diri, ke ŝi estas malbonfarta

BART.—Ja, malsana.

DON GER.—Jes, sinjoro.

BART.—Mi multe ĝojas.

DON GER.—Kiel?

BART.—Mi diris, ke mi ĝojas, ke via filino bezonas mian sciencon, kaj mi dezirus, ke vi kaj via familio estu ĉe la pordo de morto, por min dediĉi al via asisto kaj plibonfartigo.

DON GER.—Vivu mil jaroj, ke mi estimas vian bonan deziron.

BART.— Mi parolas naive.

DON GER.—Mi ja tion konstatas.

BART.—Kaj kiel via filino estas nomita?

DON GER.—Paŭlinjo.

BART.—Paŭlinjo! Beleta nomo por resaniĝi...!  
Kaj tiu ĉi servistino kiu estas?

DON GER.—Tiu ĉi servistino estas edzino de tiu. (*Li signomontras Lukon.*)

BART.—Bele!

DON GER.—Jes, sinjoro... Mi iras kondukigi tien ĉi la knabinon, por ke vi vidu ŝin.

AND.—Ŝi restis dormanta.

DON GER.—Tio ne malhelpas, ni ŝin elvekos. Venu, Gineso.

GIN.—Tien mi iras. (*Ili ambaŭ eliras tra maldekstra pordo.*)

#### SCENO IV

#### Bartolo, Andreino, Luko.

BART.—(*Alproksimiĝas al Andreino farante signojn kaj elmontrojn signifajn.*) Vi do, estas, edzino, de tiu ĉi viroto?

AND.—Por vin servi.

BART.—Kaj kiel bele ŝi elŝajnas! Kaj kian... ĝojon oni ricevas ŝin vidante... Belan buŝon ŝi havas...! Ha, kiuj dentoj, tiel blankaj, tiel tutegalaj kaj kia ĉarma vido...! Kaj la okuloj! Dum mia vivo mi vidis paron da okuloj pli parolemajn kaj pli ruzajn.

LUKO.—(*Flanken.* Kiu diablo estas tiu ĉi viro, Kaj li estas ja ŝin amflatanta, la malbenita...!) He! sinjor' doktoro, ŝanĝu la celon de interparolado, ĉar mi ne ŝatas tiujn flatdirojn. Antaŭ mi, vi preti-

gas diri am esprimojn al mia edzino? Mi ne scias, kial mi ne ekkaptis jam bastonon kaj...

(*Li esploras per rigardo, ĉu en teatro estas ia bastono. Bartolo lin haltigas*)

BART.—Jen, pro Dio, havu al mi kompaton. Kiomfoje oni devas min eksameni pri kuracisteco?

LUKO.—Bone, vi, do, atentu.

AND.—Mi eksplodas pro rido.

*Ŝi sin direktas akcepti donja Paŭlinjon, kiu eniras tra maldekstra pordo kun Don Geronimo kaj Gineso.*)

#### SCENO V

**Don Geronimo, Donja Paŭlino, Gineso, Luko,  
Bartolo, Andreino.**

DON GER.—Kuraĝiĝu, filino mia, ke mi konfidas al miregiga scienco de tiu ĉi sinjoro, kaj vi rapide rehavos vian bonfartron. Jen la knabino, sinjor' doktoro. Nu, alportu seĝojn.

(*La servistoj alportas seĝojn. Donja Paŭlino sidiĝas sur oportunan seĝegon inter Bartolo kaj sia patro. La servistoj restas malantaŭe, piedstare.*)

BART.—Tiu ĉi, do, estas via filino?

DON GER.—Alian mi ne havas, kaj se okazus al mi ŝia mortiĝo, mi freneziĝus.

BART.—Ŝi ja sin tre bone gardos de tio. Cu, do, sufiĉas simple mortiĝi, sen permeso de la kuracisto? Ne, sinjoro, ŝi ne mortiĝos... Jen vi vidas mal-sanulinon, kiu havas vizaĝon kapablan perdigi per

ravo la saĝon de la plej serioza malgajulo de la mondo. Kun ĉiuj miaj aforismoj mi certigas vin... Beleta estas ŝia vizaĝo!

D.<sup>a</sup> PAUL.—Ha, ha, ha!

DON GER.—Nu! Dank' al Dio, ke ŝi ridas, la malfeliĉulineto!

BART.—Bone! Tre favora signo! Tre favora signo! Kiam la kuracisto igas ridi la malsanulinojn, tio estas beleta afero... Nu! Kio doloras vin?

D.<sup>a</sup> PAUL.—Ba, ba, ba, ba.

BART.—He? Kion vi diras?

D.<sup>a</sup> PAUL.—Ba, ba, ba.

BART.—Ba, ba, ba, ba. Kia diabla lingvo estas tiu! Mi ne komprenas eĉ unu vorton.

DON GER.—Jen tiu estas ŝia malsano. Ŝi fine fariĝis muta, kaj oni ne povas scii la kaŭzon de tio. Konstatu, kia senkonsoliĝo por mi.

BART.—Kia malsaĝaĵo! Kontraŭe, virino kiu ne parolas estas trezoro. Mia edzino ne suferas tiun malsanon, kaj se ŝi ĝin havus, mi tre bone min gardus ŝin resanigi.

DON GER.—Malgraŭ tio, mi vin petas, ke vi apliku ĉiun vian zorgegon en celo moderigi ŝian suferon kaj forpreni de ŝi tiun malhelpilon.

BART.—Oni ja moderigos, forprenos ĝin: vi forlasu zorgon pri tio. Sed ĝi estas resanigo, kiun oni ne faras facile. Ĉu ŝi manĝas bone?

DON GER.—Jes, sinjoro, kun sufiĉa apetito.

BART.—Malbone!... Ĉu ŝi dormas?

AND.—Jes, sinjoro, ŝi kutimas regule dormi ok aŭ naŭ horojn ĉirkaŭe.

BART.—Malbone...! Kaj ŝia kapo, ĉu ĝi doloras?

DON GER.—Tion ni demandis jam al ŝi kelkfoje; ŝi diras, ke ne.

BART.—Ne? Malbone...! Ni palpu la pulson... Nu, amiko, la pulso montras... klare, estas klare.

DON GER.—Kion ĝi montras?

BART.—Ke la kapablo paroli de via filino estas fortenita!

DON GER.—Fortenita?

BART.—Jes, certe, sed kuraĝon, mi jam diris, ke ŝi resaniĝos.

DON GER.—Sed, de kio povas deveni tiu akcidento?

BART.—Tiu akcidento povis deveni kaj ja devenas (laŭ plej akceptita opinio de la aŭtoroj) de tio, ke la libera uzo de lango interrompiĝis al mia sinjorino Donja Paŭlino.

DON GER.—Tiu ĉi viro estas mirindaĵo!

LUKO.—Ĉu ne diris tion al vi?

AND.—(Tamen, al mi li ŝajnas mulo.)

LUKO.—Silentu.

DON GER.—Kaj fine, kion vi opinias, ke oni povas fari?

BART.—Oni povas kaj devas fari... La pulson... (*Palpante ĝin al donja Paŭlino.*) Aristotelo, en siaj protokoloj, parolis tre senerare pri tiu ĉi okazo!

DON GER.—Kaj kion li diris?

BART.—Diajn aferojn... La alian manon... (*Li palpas pulson de la alia mano kaj esploras ŝian langon.*) Ni vidu la langeton... Ho, kia belajeto...! Li diris... Ĉu vi komprenas latinlingvon?

DON GER.—Ne, sinjoro, eĉ vorton mi ne komprenas.

BART.—Tio ne malhelpas. Li diris: *Bonus bona bonum, uncias duas, mascula sunt maribus, honora medicum, acina acinis, est modus in rebus. Amaryllida sylvas.* Kio volas diri: ke tiun ĉi difekton pri malmoliĝo ĉe lango kaŭzas iaj puŝaĵoj kiujn ni nomas pusaĵoj akraj, emaj, spontaneaj kaj putrigaj. Ĉar, la vaporoj kiuj altiĝas el la kavo... Ĉu vi estas...?

AND.—Jes, ni ĉiuj estas ĉi tie.

BART.—El la lumba kavo, transpasinte de la maldekstra flanko, kie kuŝas hepato, en la dekstran, kie troviĝas koro, ili okupas tutan duodeninteston kaj parton el kranio; de tio sekvas la doktrino de Aŭsias Mark kaj Kalepino (kvankam mi kontraŭe opinias), ke la malbonigeco de la nomitaj vaporoj... Ĉu mi klarigas?

DON GER.—Jes, sinjoro, perfekte.

BART.—Nu, kiel mi diris: premtenante la karunkolojn kaj epidermon, tiuj vaporoj necese malpermesas, ke la oreltambureto transigu en metakarbon la stomakajn sukojn. *Doceo, doces, docere, docui, doctum, ars longa, vita brevis: templum, templi: angusta vindelicorum, et reliqua...* Kiel? Ĉu mi diris ion?



DON GER.—Ĉion, kion oni devis diri.

GIN.—Li estas ja eksterordinara viro!

DON GER.—Nur, mi rimarkis ian eraron en tio, kion...

BART.—Eraron? Ĝi ne povas esti. Neniam mi eraras.

DON GER.—Mi kredas, ke vi diris ke la koro staras dekstre kaj la hepato maldekstre, kaj nur la malo estas ja vera.

BART.—Viro ignoreganta super tuta ignoreco de ĉiuj ignoruloj! Nun vi elmontras al mi tian malnovajon! Jes, sinjoro, efektive, tiel estis antikve, sed nun ni interkonsentis pri alia sistemo.

DON GER.—Pardonu min, se per tio mi povis vin ofendi.

BART.—Vi jam estas pardonita. Vi ne scias latinlingvon kaj sekve estas pravigite ke vi ne havas eĉ la komunan saĝon.

DON GER.—Kaj kion vi opinias, ke ni devas fari pri la malsanulino?

BART.—Unue, vi ŝin kuŝigos, poste oni faros al ŝi fortajn frotojn... kompreneble mi mem tion faros... kaj poste ĉiuduonhore ŝi manĝos grandan vinsupon.

AND.—Kia sensencaĵo!

DON GER.—Kaj por kio taŭgas vinsupo?

BART.—Ho, amiko mia! Kiom vi bezonas ion ellerni pri ortografio! La vinsupo taŭgas por igi ŝin paroli. Ĉar ĉe pano kaj vino, kiam la unua

estas en la alian trempita, enestas efiko simpatia, kiu simpatiigas kaj ensorbas la ĉelaran histon kaj la *pia mater*, kaj la mutulojn igas paroli.

DON GER.—Nu, mi ĝin ne sciis.

BART.—Vi ja scias nenion.

DON GER.—Estas vere ke mi nek ellernis, nek...

BART.—Ĉu vi ne konstatis, do, kompatindulo, vi ne konstatis, ke oni supersatigas la papagojn per en vino trempita pano?

DON GER.—Jes, sinjoro.

BART.—Kaj la papagoj ne parolas, do? Nur por ke ili parolu, oni igas ke ili manĝu tion, kaj ankaŭ ni agos same pri donja Paŭlinjo, kaj tre baldaŭ ŝi parolados pli ol sep papagoj kune.

DON GER.—Ja anĝelo kondukis vin ĉe min, sinjor' doktoro; nu, filineto, ni iru, vi jam deziros ripozi... Mi tuj revenos, sinjor' don... kiel vi estas nomita?

BART.—Don Bartolo.

DON GER.—Bone, tuj kiam ŝi estos kuŝinta, mi revenos al vi, sinjor' don Bartolo. (*Ili tri sin levas.*) Helpu ĉi tie, Andreino... Malrapidete.

BART.—Bone ŝin vestoŝirmu, ke ŝi ne malvarmumu. Adiaŭ, fraŭlino.

DON GER.—(*Li ŝajnigas foriri akompanante donja Paŭlinon kaj tuj revenas por flanken paroli kun Luko.*)

(Luko, foriru tuj kaj taŭgaranĝu la ĉambbron de l' sinjor' doktoro, ĉio bone purigita, oportuna

lito, la verda litkovrilo, la sitelo kun akvo, la lavvazo, la tualettuko, fine ke nenio manku... ĉu vi komprenas?

LUKO.—Jes, sinjoro. (*Li eliras tra la dekstra pordo.*)

DON GER.—Ni iru, filineto mia.

(*Don Geronimo, donja Faŭlino, Andreino kaj Gineso eliras tra la maldekstra pordo.*)

BART.—Mi ŝvitas... Neniam mi trovis min en pli granda penado... Estas ja neeble, ke tio ĉi bone finiĝu, neeble!... Mi esploros, ĉu nun, kiam ĉiuj staras tie interne, mi povas... Kaj se ne, malbona afero... Sur la dorso mi sentas ĝenpremon, kiu ne min lasas... kaj tio ja ne estas pro la bastonbatoj ricevitaj, sed pro tiuj ankoraŭ ricevotaj.

(*Li eliras tra la dekstraflanka pordo.*)

## AKTO III

## SCENO I

**Bartolo** (*eniras sen ĉapelo kaj sen bastono tra dekstra pordo*). **Don Geronimo**.

BART.—Nu, tio estas ja vidita. Mia celo nerimarkate malaperi, estas ja sensukcesa afero... La fripono kun preteksto taŭgaranĝi mian ĉambron, ne sin movas de tie... Ho ve, malfeliĉa Bartolo!... (*Promenante malkviete sur la teatro.*) Nu, kuraĝon, kaj okazu, kio Dio bonvolos.

DON GER.—(*Eniras tra maldekstra pordo.*)

Ne estis rimedo trovebla por igi ŝin, ke ŝi kuŝiĝu. Oni estas nun preparante al ŝi la vinsupon, kiun vi ordonis. Ni konstatos tion, kio rezultos.

BART.—Estas nepre sendube, ke la rezultato estos sukcesega...

DON GER.—Amiko Don Bartolo, en mia domo oni servos kaj regalos vin kiel princon, kaj dume, mi deziras, ke vi bonvolu alpreni tiujn skudetojn.<sup>1</sup>

(*Li eltiras monujon kaj prenas el ĝi kelkajn skudetojn.*)

<sup>1</sup> Hispana ormonero valoranta 21 1/4 realojn.

BART.—Ne parolu pri tio.

DON GER.—Faru al mi tiun plezuron, mi petas

BART.—Tiun aferon ni ne traktu.

DON GER.—Nu, alkonsentu.

BART.—Mi ne laboras por la mono.

DON GER.—Mi ja kredas tion, tamen...

BART.—Ĉu la skudetoj estas novaj?

DON GER.—Jes, sinjoro.

BART.—Bone, ĉar ili estas novaj, mi ilin alprenos. (*Li alprenas kaj enpoŝigas ilin.*)

DON GER.—Nun, do, vi restu kun Dio: mi iros vidi, ĉu ĉio estas en ordo kaj tuj revenos... La knabino igas min esti tiom maltrankvila, ke mi ne povas iom resti ie.

## SCENO II

**Leandro** (*kiu eniras tra la dekstra' pordo penante ne esti rimarkita.*)

LEAN.—Sinjor' doktoro mi venas elpeti vian helpon kaj esperas ke...

BART.—Ni esploru la pulson... (*Li palpas lian pulson kun malplezura gesto.*) Nu, tio neniel min plaĉas... kaj kion vi sentas?

LEAN.—Sed mi ja ne venis, por ke vi min kuracu: mi ja suferas ne nian malsanon.

BART.—(*Malatable.*) Sed por kiu diablo vi venis?

BART.—Ne parolu pri tio.

DON GER.—Faru al mi tiun plezuron, mi petas

BART.—Tiun aferon ni ne traktu.

DON GER.—Nu, alkonsentu.

BART.—Mi ne laboras por la mono.

DON GER.—Mi ja kredas tion, tamen...

BART.—Ĉu la skudetoj estas novaj?

DON GER.—Jes, sinjoro.

BART.—Bone, ĉar ili estas novaj, mi ilin alprenos. (*Li alprenas kaj enpoŝigas ilin.*)

DON GER.—Nun, do, vi restu kun Dio: mi iros vidi, ĉu ĉio estas en ordo kaj tuj revenos... La knabino igas min esti tiom maltrankvila, ke mi ne povas iom resti ie.

## SCENO II

**Leandro** (*kui eniras tra la dekstra' pordo penante ne esti rimarkita*).

LEAN.—Sinjor' doktoro mi venas elpeti vian helpon kaj esperas ke...

BART.—Ni esploru la pulson... (*Li palpas lian pulson kun malplezura gesto.*) Nu, tio neniel min plaĉas... kaj kion vi sentas?

LEAN.—Sed mi ja ne venis, por ke vi min kuracu: mi ja suferas ne nian malsanon.

BART.—(*Malatable.*) Sed por kiu diablo vi venis?

LEAN.—Por eldiri al vi, per du vortoj, ke mi estas Leandro.

BART.—Kaj per kio min tuŝas, ke vi estas nomita Leandro aŭ io ajn alia? (*Plilaŭtigante la voĉon. Leandro alparolas mallaŭte kaj mistere*)

LEAN.—Mi klarigos. Mi estas enamiĝanta pri donja Paŭlino: ŝi min amas, sed ŝia patro ne permesas, ke mi ŝin vidu... Mi estas en malespero kaj venas peti vin, ke vi liveru al mi okazon, pretekston por paroli kun ŝi...

BART.—Kio signifas en Esperanto <sup>1</sup> ke mi agu, kiel amperanto. (*Kolerigite kaj plilaŭtigante sian voĉon.*) Kuracisto! Tia viro, kiel mi!... Foriru de tie ĉi.

LEAN.—Sinjoro...

BART.—Tio ja estas granda insultaĵo, sinjoro!

LEAN.—Silentu, sinjoro, ne krii.

BART.—Mi volas krii... vi estas senpripensulo!

LEAN.—Pro Dio, sinjor' doktoro.

BART.—Mi, amperanto? Vi, danku, ke...  
(*Li paŝadas malkviete.*)

LEAN.—(Dio min helpu, kia viro! Mi ekprovu, ĉu...)

BART.—Tia senhonteco!

LEAN.—Alprenu... kaj mi petas pardonon por mia kuraĝo.

(*Li eltiras monujon kaj kiam Bartolo turniras*

<sup>1</sup> La originalo diras: «en hispana lingvo».

*al li, li demetas ĝin en lian manon. Bartolo alprenas kaj enpoŝigas ĝin, kaj mallaŭte reparaolas al Leandro konfidencie.)*

BART.—Nu, tio estis ja nenio.

LEAN.—Mi konfesas, ke mi eraris kaj konduktis iom...

BART.—Kiel erari? Viro kiel vi! Kia sensencaĵo Vi, do...

LEAN.—Bone, tiu knabino vivas malfeliĉe. Ŝia patro ne volas ŝin edzinigi, por eviti elspezi la dotaĵon. Si ŝajnis estis malsana. Kelkaj kuracistoj venis al ŝi, kaj receptordonis tiom da medikamentoj, kiom apoteko enhavas; ŝi englutis nenian, kiel oni povas ja kompreni, kaj fine enuigite pro iliaj vizitoj, interkonsiliĝoj kaj tedaj eldandoj, ŝi ŝajnis esti muta, kvankam ŝi ne estas tia.

BART.—Sekve ĉio estis trompartifiko?

LEAN.—Jes, sinjoro.

BART.—Ĉu ŝia patro vin konas?

LEAN.—Ne, sinjoro, li ne konas min persone.

BART.—Kaj ŝi ja vin amas? Ĉu estas certe?

LEAN.—Ho, jes, mi estas tre konviktita pri tio.

BART.—Kaj pri la servistoj?...

LEAN.—Gineso ne min konas, ĉar antaŭ tre mallonge estis akceptita kiel servisto: Andreino konas tiun ĉi sekreton; pri ŝia edzo, se li ĝin ne scias, almenaŭ suspektas pri tio kaj silentas, kaj mi povas esti certa, ke ili ambaŭ min helpos.



BART. — Nu! Mi igos, ke hodiaŭ mem vi edziĝu kun donja Paŭlino.

LEAN. — Ĉu vere?

BART. — Kiam mi tion diras...

LEAN. — Ĉu estus eble?

BART. — Ĉu mi ne certigis vin pri tio? Mi edziĝos vin kun ŝi, kun ŝia patro kaj kun ĉiujn ŝiaj ceteraj geparencoj; mi diros, ke vi estas... farmaciisto.

LEAN. — Sed mi ja nenion scias pri tiu scienco?

BART. — Malzorgu pri tio, la samo okazas al mi. Mi estas tiel kompetenta pri medicino, kiel... pudelo.

LEAN. — Vi, do, ne estas kuracisto?

BART. — Tute ne. Oni igis min kuracisto per aparta maniero, sed spite tiun doktorekzamenon, mi ja ne estas tia, kian oni min prezentas. Kio nun taŭgas, tio estas, ke vi restu proksime de tie ĉi, kaj mi alvokos vin ĝustatempe.

LEAN. — Bone, mi esperas ke vi... (*Li eliras tra maldekstra pordo.*)

BART. — Iru kun Dio.

### SCENO III

#### Andreino, Bartolo *poste* Luko.

AND. — Sinjor' kuracisto, ŝajnas al mi, ke la malsanulino volas malsukcesigi vin ĉar.

BART. — Se mi sukcesas pri via akcepto, karu-

lino mia, ĉio cetera estas por mi malsateginda; kaj se mi vin resanigos, estos ja por mi sengrava la mortiĝo de la tuta homaro... (*Eniras Luko tra la dekstra pordo: li alproksimiĝas post Bartolo kaj aŭskultas.*)

AND.—Mi tute ne estas malsana.

BART.—Nu, plej bone estos, do, resanigi vian edzon! Kia brutulo li estas! Kia enuiga ĵaluzulo!

AND.—Kaj kial tio ŝajnas al vi stranga? Ĉiu pri-zorgas siaĵon!

BART.—Kial via gracia korpo devas aparteni al tiu maldelikatulo? (*Li rekte iras al ŝi kun la brakoj malfermitaj, preta ŝin ĉirkaŭpremi. Andreino iom post iom foriĝas. Kaŭriĝante Luko transiras sublia brako, turnas sin rekte al lia vizaĝo kaj ili ambaŭ ĉirkaŭpremiĝas. Andreino foriras ridante tra la maldekstra pordo.*)

LUKO.—Ĉu mi ne diris al vi, sinjor' doktoro, ke mi ne ŝatas ĉi tiujn ŝercojn? Ĉu mi ne diris tion al vi?

BART.—Nu, amiko, ĉe tio ne estas malbonintenco, nek...

LUKO (*al Andreino*).—Foriru de tie ĉi. (*Al li.*) Ĉu bonintence aŭ malbonintence, mi trafendos al vi la kapon per dikbastono, se vi nur levos ree okulojn por ŝin rigardi. Ĉu vi komprenas?

BART.—Jes, mi ja komprenas.

LUKO.—Atentu pri mi. (*Li sin atartigas de li per forpuŝego.*) Ĉu oni trovos pli intringeman voluptulon, ol li!

## SCENO IV

**Bartolo, Luko, Don Geronimo** *venanta de maldekstre, poste Leandro.*

DON GER.—Ho ve, amiko Don Bartolo, la mal-feliĉa knabino ne plibonfartiĝas. De kiam ŝi englutis la vinsupon, ŝi fartas pli malbone.

BART.—Bone, jen bona afero; tio montras, ke la sanigilo estas efikanta; eĉ se vi vidos ŝin agonianta, vi ne devas ĉagreniĝi, ĉar mi tie ĉi staras. Pli bone, Don Kazimiro, Don Kazimiro. (*Vokante al la dekstra pordo.*)

LEAN. (*el interne*).—Sinjoro.

BART.—Don Kazimiro.

LEAN.—Kion vi ordonas (*Li eliras.*)

DON GER.—Kiu, do, estas tiu ĉi viro?

BART.—Bonega didaktikulo... apotekisto, kiel vi diras. Eminent profesoro; mi venigis lin, por ke li preparu kat'aplasmon el ĉiuspecaj floroj, moligaj, mallaksigaj, dialektikaj, pirotekniaj kaj narkotikaj, kiun estos necese almeti al la malsanulino.

DON GER.—Atentu, kiel malvigla ŝi estas.

BART.—Tio ne malhelpas, ŝi tre baldaŭ resaniĝos.

## SCENO V

*La diritaj, Donja Paŭlino, Andreino kaj Gineso enirantaj tra maldekstra pordo.*

BART.—Don Kazimiro, palpu ŝian pulson, esploru ŝin atente kaj poste ni parolos.

*(Leandro iras kaj parolas sekrete kun donja Paŭlino, dum li ŝajnigas palpi ŝian pulson. Andreino intermetiĝas en ilia parolado. Restas malproksime ĉe unu flanko Bartolo kaj Don Geronimo, ĉe la alia Gineso kaj Luko.)*

DON GER.—Sekve, li ja estas lerta viro? He?

BART.—Neniu superis lin pri ĉio, koncernanta plastrojn, ŝmirajojn, rosoliojn<sup>1</sup> nomitajn *de perfecta amo* kaj *de lakto de maljunulinoj*, *ceratojn*<sup>2</sup> kaj *julepojn*.<sup>3</sup> Por kio vi kredas ke mi veninigis lin?

DON GER.—Mi ĝin supozas. Ĉar vi per li vin helpas, li ja ne estas sentaŭgulo!

BART.—Sentaŭgulo! Kiel sentaŭgulo? tute ne, sinjoro, oni ne povas pensatingi lian lerteron, tiom granda ĝi estas!

D.<sup>a</sup> PAUL.—Ĉiam, ĉiam mi restos via, Leandro

<sup>1</sup> Latine, *ros solis*.

<sup>2</sup> Latine, *ceratum*.

<sup>3</sup> Latine, *julepus, julapium*.

DON GER.—He, ĉu eble mi revas? Ĉu ŝi parolis, Andreino? (*Sin turnante tien, kie lia filino staras.*)

AND.—Jes, sinjoro, tri aŭ kvar vortojn ŝi eldiris.

DON GER.—Dio estu benata! Filino mia! Admirinda kuracisto! (*Li ĉirkaŭpremas Donja Paŭlinon kaj revenas tre gaje al Bartolo, kiu pasadas tre kontentelmontre.*)

BART.—Ho, kian klopodon mi devis havi por forigi la penigan malsanon! Jen tie ĉi mi volus esti vidinta kunigita la tutan veterinaron, por konstati, kion ĝi estus farinta!

DON GER.—Paŭlinjo, filino, vi, do, povas paroli, ĉu vere? Nu, diru ion. (*Li reparolas kun sia filino kaj kondukas ŝin prenante ŝian manon.*)

GIN. (*al Luko.*)—(Ŝajnas al mi, ke tie ĉi estas a mistera afero... ĉu ne?)

LUKO.—(Vi silentu kaj ne intervenu.)

D.<sup>a</sup> PAUL.—Jes, patro, mi denove ricevis la eblon paroli por diri al vi, ke mi amas Leandron kaj deziras edziniĝi je li.

DON GER.—Sed...

D.<sup>a</sup> PAUL.—Nenio povas aliigi mian decidon.

DON GER.—Tamen...

D.<sup>a</sup> PAUL.—Por nenio taŭgos, ĉio, kion vi diros; mi volas edziniĝi je viro, kiu min amegas. Se vi multe min amas, donu al mi vian permeson sen pretekstoj nek prokrastoj.

DON GER.—Sed, filino mia, tiu Leandro estas malriĉulo.

D.<sup>a</sup> PAUL.—Post nelonge li fariĝos tre riĉa, vi ja tion scias; kaj cetere «ĉe skabio ŝate alprenita, juko ne estas sentita».

DON GER.—Sed, kia amasego da vortoj subite elfluis el ŝia buŝo! Filino mia, ne persistu pri tio, ĉar ĝi ne okazos!

D.<sup>a</sup> PAUL.—Vi, do, konstatu perdon de via filino, ĉar mi mortigis pro malespero.

DON GER.—Kio okazas al mi! (*Sin movante de unu en alian flankon, agite kaj kolere. Donja Paŭlino reiras postscenen kaj parolas kun Leandro kaj Andreino.*) Sinjor' doktoro, faru al mi la bonecon, igi ke ŝi denove mutiĝu.

BART.—Tio estas neebla. Por vin servi, kion mi nur povas fari, tio estas vin surdigi, por ke vi ne aŭdu ŝin.

DON GER.—Mi dankas vin senfine. Sed vi kredas, malobeas filino, ke... (*Irante al donja Paŭlino. Bartolo lin detenas*).

BART.—Oni ne devas koleri; se ne, ĉio perdiĝos. Kio taŭgas estas distri kaj amuzi ŝin. Permesu, ke ŝi iru iom promenadi en ĝardeno je libera aero, kaj vi konstatos ke iom post iom ŝi forgesos tiun demonon Leandron. Iru akompani ŝin, Don Kazimiro, kaj zorgu, ke ŝi ne surpaŝu ian malbonan herbon.

LEAN.—Kiel vi ordonas, sinjor' doktoro. Ni iru, fraŭlino.

D.<sup>a</sup> PAUL.—Ni iru en feliĉa horo.

DON GER.—Iru vi ankaŭ. (*Al Luko kaj Geneso, kinj kun donja Paŭlino, Leandro kaj Andreino foriras tra la funda porto.*)

## SCENO VI

### Don Geronimo kaj Bartolo.

DON GER.—Nu, mi ja neniam vidis tian senhontecon!

BART.—Ĝi estas necesa sekvo de la malsano, kiun ŝi ĝis nun suferadis. La lasta ideo, kiun ŝi havis antaŭ ol mutiĝi, estis sendube pri ŝia edziĝo kun tiu fripono Aleksandro, aŭ Leandro, aŭ kiel li estas nomita. Okazis al ŝi la akcidento kaj kelkaj tuj elparolotaj vortoj restis interne ne eldiritaj kaj jen dum ŝi estos ne elparolinta ilin kaj el tio ne ellibiriĝinta, oni ne devas esperi ke ŝi trankviliĝu kaj parolu saĝe.

DON GER.—Kion vi diras? Nu, tiu klarigo ja min konvinkas. (*Li eltiras flartabakujon kaj ili ambaŭ prenetas polvotabakon.*)

BART.—Ho, se vi iom scius pri numismatiko, vi tion komprenus multe pli bone. Donu al mi preneton da flartabako.

DON GER.—Sekve, kiam ŝi estos ellasinta...

BART.—Ne dubu pri tio... Ĝi estas eligo, kiun ni nomas *tricolos tetrastrofos*.

## SCENO VII

*La diritaj Luko, Andreino kaj Gineso, kiuj  
siatempo eniros de maldekstre.*

AND.—Sinjor' mastro.

LUKO.—Sinjor' Don Geronimo... Ho, kia mal-feliĉo!

AND.—Ho, ve, mia karega mastro! oni ĵus forkondukis ŝin!

DON GER.—Sed kiun oni forkondukis?

LUKO.—La apotekisto, ne estas apotekisto.

GIN.—Nek li estas nomita Don Kazimiro.

AND.—La apotekisto nur estas Leandro mem, kaj li rabe forkondukis vian filinon.

DON GER.—Kion vi diras? Ho ve al mi! Kaj vi bestoj, vi ja permesis, ke sola viro tiamaniere trompu vin ĉiujn?

LUKO.—Ne, li ne staris sola, li staris kun pistolo. La diablo alproksimiĝu al li!...

DON GER.—Sed tiu ĉi fripona kuracisto...

BART. (*Plena je timo.*)—(Ŝajnas al mi, ke baldaŭ okazos al mi la tria surbatado.)

DON GER.—Tiu ĉi fripono, kiu estis lia amperanto... Tuj serĉu al mi ŝnuron!

AND.—Tie estas unu longa sur kiu oni pendegas lavitan tolaĵon.



LUKO.—Jes, mi ja scias kie ĝi estas. Mi tuj iras ĝin alporti. (*Li eliras tra maldekstra pordo kaj tuj revenas portanta tre longan ŝnuron.*)

DON GER.—Mi pagos ja al li... Sed kien ili forkuris? Dio min helpu!

AND.—Mi kredas ke ili foriris tra la ĝardena pordo, kiu kondukas en kamparon.

LUKO.—Jen estas la ŝnuro.

DON GER.—Nu, tuj alligu forte je piedoj kaj manoj la doktoron, tien ĉi en tiun ĉi seĝon, sed vi devas lin ĉirkaŭligi per tre streĉita ŝnuro.

GIN.—Ne zorgu pri tio. Nu, sinjoro Don Bartolo! (*Bartolo volas forkuri. La servistoj lin detenas, sidigas lin en la oportunan seĝegon, alligas lin al ĝi, kaj multe ĉirkaŭvolvas la ŝnuron.*)

DON GER.—Mi iras serĉi tiun friponinon... mi iras sciigi la juĝiston kaj morgaŭ sen ia prokrasto, tiu ĉi fripona kuracisto mortos pendigita Andreino, iru, mia kara, en la fenestron de la manĝoĉambro, kaj konstatu ĉu el tie oni ankoraŭ vidas ilin por la kamparo; mi demandos sciigojn al tiuj, kiuj estas en la muelejo. Kaj vi atentu observi tiun hundon. (*Li foriras tra dekstra pordo kaj Andreino tra maldekstra. Luko kaj Gineso daŭrigas ĉirkaŭligi Bartolon.*)

## SCENO VIII

**Bartolo, Luko kaj Gineso kaj poste Martenino**  
*venanta de dekstre.*

GIN.—Ankoraŭ ĉirkaŭligu tien ĉi.

LUKO.—Ĉu vi ne scias, ke la amiko Bartolo sin amuzadis dirante amflataĵojn al mia edzino?

GIN.—Atendu, ke oni pagos al li por ĉio kune

BART.—Ĉu mi tiel sidas bone?

GIN.—Bonege!

MART.—Dio vin gardu, sinjoroj.

LUKO.—Nu, jen vi staras tie ĉi! Kia bona celo alportas vin en tiun ĉi domon.

MART.—La deziro sciigi pri mia malfeliĉeta edzo. Kion vi faris el li?

BART.—Jen estas via edzo, Martenino; igardur lin, jen li!

MART.—Ho, mia kara edzo. (*Ŝi ĉirkaŭpremas Bartolon.*)

LUKO.—Do, ŝi estas la kuracistedzino?

GIN.—Tial ŝi tiel laŭdegis al ni la lertecon de la kuracisto.

LUKO.—Eĉ se ĝi estus tre granda, li ne evitos esti pendigita.

MART.—Kion vi diras?

BART.—Jes, mia kara, morgaŭ oni min pendigos nepre.

MART.—Kaj vi ne hontos mortante antaŭ multe nombra amaso?

BART.—Kaj kio helpos, mia ĉarmulino? Mi ja volus tion eviti, sed oni obstinis...

MART.—Sed, kial oni pendigos vin, malfeliĉuleto, kial?

BART.—Jen afero longe raportebla; tial ke mi mirige sukcesis pri malsano, oni decidis pendigi min, anstataŭ nomi min ĉefkuracisto.

## SCENO IX

*La diritaj, Don Geronimo kiu venas de dekstre, poste Andreino de maldekstre.*

DON GER.—Nu, amikoj, kuraĝon: mi irigis senditon Miraflores' on: hodiaŭ vespere venos sen prokrasto la juĝisto kaj helpantoj kaj ili forkondukos tiun friponon. Kaj vi, kion vi faris, ĉu vi ilin vidis?

AND.—Ne, sinjoro, mi ne vidis ilin.

DON GER.—Nek mi ankaŭ. Mi demandis kaj neniu donis al mi sciigon... mi frenezigos. Kien ili iris? Kion ili nun faras?

## SCENO LASTA

- *La diritaj Donja Paŭlino kaj Leandro tra dekstra pordo.*

LEAN.—Sinjor' don Geronimo.

D.<sup>a</sup> PAUL.—Kara patro!

DON GER.—Kio estas tio ĉi, malbonuloj, malnobluloj! (*Leandro kaj donja Paŭlino. sursgeniĝas je la piedojn de don Geronimo.*)

LEAN.—Tio estas rebonigi eraron. Ni estis decidintaj iri Bujtragon kaj tie kunedziĝi, en la certeco ke mi tie havas onklon, kiu ne malaprobas tiun ĉi edzecon: sed ni pli bone pripensis: mi ne volas, ke oni diru ke mi forrabis vian filinon, ĉar tio estus nedeca por ŝia honoro, nek por la mia; mi volas, ke vi konsentu pri tio, kun plena libero, mi volas akcepti ŝin de via mano. Jen ŝi estas, preta fari kion vi ordonos: sed mi avertas vin, ke se vi ne edzinigos ŝin je mi, ŝia ĉagreno forprenos de ŝi la vivon, kaj se vi konsentas pri la peto, kiun ni ambaŭ al vi faras, ne estos necese sin okupi pri doto.

DON GER.—Amiko, mi iom ŝuldas kaj ne povas...

LEAN.—Mi jam diris, ke oni ne parulu pri mondono.

D.<sup>a</sup> PAUL.—Leandro amas min multe, por ne konduti kun deca malavareco. Li amas min, ne vian monon.

DON GER.—(*Makvietigante.*) Vian monon, vian monon. Kian monon, babilulino? Ĉu mi ne diris jam, ke mi havas ŝuldojn? Mi nenion povas doni ne persistu.

LEAN.—Nu, bone; ja pro tio mi diris al vi, ke ni postulos nenion.

DON GER.—Eĉ moneron.

D.<sup>a</sup> PAUL.—Ne, eĉ duonmoneron!

DON GER.—Tamen, se mi konsentos, kiu nutros vin, malsaĝulo?

LEAN.—Mia onklo. Ĉu vi ne aŭdis, ke li aprobas nian edzecon? Kion plie mi devas diri?

DON GER.—Ĉu oni scias jam, ĉu li ion antaŭdecidis?

LEAN.—Jes, sinjoro, mi estas lia heredonto.

DON GER.—Kiel li fartas? ĉu li estas fortiketa?

LEAN.—Ne, sinjoro, li estas tre malfortika. Tiu krura malsanemo ĝenas lin multe, kaj ni timas ĉiumomente ke...

DON GER.—Nu, bone! Nenio povas malhelpi! Sekve... mi konsentas kaj donu al mi paron da ĉirkaŭpremoj. (*Li levigas kaj ĉirkaŭpremas ilin. Ambaŭ kisas liajn manojn.*)

LEAN.—Vi ĉiam trovos en mi filon obeeman.

D.<sup>a</sup> PAUL.—Vi igas nun tute feliĉaj. (*Kisinte la manon de sia patro, ŝi kuras al Andreino kaj ili ambaŭ ĉirkaŭprenas unu la alian.*)

BART.—Kaj min, kiu igas min feliĉa? Ĉu ne estas iu por min malligi?

DON GER.—Liberigu lin! (*La servistoj malligas Bartolon.*)

LEAN.—Sed kiu metis vin en tiun staton, eminenta kuracisto?

BART.—Viaj pekoj, ĉar la miaj ne tiom multe meritas.

LEAN.—Nu, bone, ĉio finiĝis, kaj ni scios danki vin pro la favoro, kiun vi faris al ni.

MART.—Mia edzo! (*Ciukaŭpremante Bartolon.*) Mian gratulon, ĉar oni ne pendigas vin. Atentu, min trakti bone, ĉar al mi vi ŝuldas la doktorecon, kiun oni aljuĝis al vi sur la monto.

BART.—Al vi? Mi, do, ĝojas ĝin scii.


MART.—Jes, efektive; mi diris, ke vi estas mirindaĵo pri medicino.

GIN.—Kaj mi tion kredis, ĉar ŝi tion diris.

LUKO.—Kaj mi kredis tion, ĉar ŝi diris tion.

DON GER.—Kaj mi, ĉar ili tion diris, ankaŭ kredis, kaj admiris, kiel orakolon, ĉion, kion li diris.

LEAN.—Tiel la mondo iradas. Multaj akiras famon kiel saĝuloj ne pro tio, kion ili efektive scias, sed nur pro favora opinio, kiun la ignoreco de la ceteraj homoj aljuĝas al ili.



| Pago | Linio.     | Diras            | Devas diri       |
|------|------------|------------------|------------------|
| 27   | 6          | eksameni         | ekzameni         |
| 27   | 25         | Cu,              | Ĉu,              |
| 29   | 17         | autoŝoj          | aŭtoŝoj          |
| 29   | 21         | Ĉu ne            | Ĉu ni ne         |
| 30   | 12         | puŝaĵoj          | pusaĵoj          |
| 35   | 24         | ne nian          | nenian           |
| 37   | 11         | estis            | esti             |
| 38   | antaŭlasta | ĉar              | ĉar...           |
| 39   | 15         | sublia           | sub lia          |
| 39   | 28         | <i>atartigas</i> | <i>apartigas</i> |
| 40   | 18         | kaj'aplasmon     | kataplasmon      |
| 41   | 20         | lerteron         | lertecon         |
| 42   | 18         | a                | ia               |
| 45   | 7          | forkoudukis      | forkondukis      |
| 47   | 15         | igardur          | rigardu          |